La Hodiaŭa Ĵurnalo
2017-12-11 n-ro 382

# Restas semajno por kandidatigi al Nobelo




Irako deklaris liberiĝon de ĉiuj regionoj okupataj de Islama Ŝtato

Jerusalemo: kolera vendredo kontraŭ la decido de Trump

La arto pri napola pico iĝas homara heredaĵo

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Jerusalemo: kolera vendredo kontraŭ la decido de TRUMP
*Interbataloj eksplodis en pluraj lokoj inter manifestaciantoj kaj israelaj soldatoj p. 03*

Irako deklaris liberiĝon de ĉiuj regionoj okupataj de Islama Ŝtato
*Kaj ekregis la tutan landlimon kun Sirio p. 04*

Senditoj de gvidantoj de kvar landoj diskutis pri situacio en Orienta Ukrainio
*Rusio, Germanio, Francio kaj Ukrainio p. 04*

KDPR: Vizito de oficialuloj de UN akcelis interkomprenon
*Kompreno inter la lando kaj la sekretariejo de UN p. 05*

Politika ĉefo de UN emfazas urĝecon mildigi streĉecon sur la Korea Duoninsulo
*Post sia kvar-taga vizito al la Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR) p. 05*

Alfred NOBEL
*Sveda kemiisto kaj filantropo p. 06*

Restas semajno por kandidatigi al Nobelo
*Nomo reprezentanta la esperantan literaturon p. 07*

La arto pri napola pico iĝas homara heredaĵo
*Napolo (Itallando) estas la origina loko de la pico p. 07*

Hodiaŭe
*Aleksandr SOLĴENICIN; Alfred de MUSSET; Naguib MAHFOUZ; kaj Juptero p. 08*

# Jerusalemo: kolera vendredo kontraŭ la decido de TRUMP

En la palestinaj teritorioj, tiu ĉi vendredo [08 dec 2017] spertis streĉitecan etoson. Interbataloj eksplodis en pluraj lokoj inter manifestaciantoj kaj israelaj soldatoj. La plej perfortaj alfrontiĝoj okazis en *Bet-Leĥem*, Hebrono et Ramalaho. Amenaŭ du viroj estis mortigitaj en Gazao. La kolero celis la decidon de Donald TRUMP, kiu agnoskas Jerusalemon, kiel ĉefurbon de Israelo. En Jerusalemo mem, post la vendreda preĝo, kelkaj centoj da personoj manifestaciis, okazigante kelkajn interpuŝiĝadojn kun la policistoj.

La sloganoj postulis liberigon de Palestino, finon de la okupacio de Jerusalemo, kaj kondamnas la agnoskon de la urbo kiel ĉefurbo de Israelo, fare de Usono. Tamen la ĵusa decido de Donald TRUMP instigas la palestinajn manifestaciantojn postuli ankaŭ la foriron de siaj gvidantoj: «Se oni volas ĉesigi la israelan okupacion, ni devas antaŭ tio malmandati la Palestinajn aŭtoritatojn, kondamni la interkonsentojn de Olso, kaj rekuniĝi kiel revolucia potenco. Ni ne devas kalkuli pri la Palestinaj aŭtoritatoj, kiuj estas koruptitaj, kaj en morala kolapso».

La tago pasis sub la signo de la «kolero» fare de la palestinaj frakcioj. Sed la protestantoj asertas, ke ili ne respondis al politika alvoko. Laŭ ili, la transloko anoncita fare de la usona ambasadejo, de Tel-Avivo al Jerusalemo, estas simbolo de tute nefunkcianta sistemo.



«La homoj estas frustritaj pro tiu situacio, konfidas George. La internacia komunumo ne respektas siajn engaĝiĝojn, kiel la rezoluciojn de UN por ĉesigi la okupacion aŭ la ne-rekonon de Jerusalemo, kiel ĉefurbo de Israelo. Ankaŭ pro la malhonesta rolo de Usono».

Dum kvar horoj, la manifestaciantoj okupis malgrandan placon antaŭ la malnova urbo. Plurfoje, ili estis elpelitaj de la policistoj. Fine de la post-tagmezo, la alirejo al la areo estis blokita. La manifestaciantoj forlasis la lokon.

Neniam Milito Inter Ni

# Irako deklaris liberiĝon de ĉiuj regionoj okupataj de Islama Ŝtato

La Iraka armeo deklaris sabate [09 dec 2017], ke la registara armeo liberigis ĉiujn regionojn okupatajn de la ekstremisma grupo Islama Ŝtato kaj ekregis la tutan landlimon kun Sirio.




Oficiro de la komandejo de la Iraka komuna operaco Abdul Amir Yarallah diris en deklaro, ke la registara armeo kaj ŝijaista milico sabate [09 dec 2017] liberigis la regionon inter la provincoj *al-Anbar* kaj *Nivewa*, kaj la landlimo inter Irako kaj Sirio estas tute sub la regado de la Iraka armeo. Yarallah diris, ke la liberiĝo de la regiono signifas, ke la registara armeo jam liberigis ĉiujn regionojn okupatajn de la grupo Islama Ŝtato.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Senditoj de gvidantoj de kvar landoj diskutis pri situacio en Orienta Ukrainio

Proparolanto de la belorusa Ministerio de Eksterlandaj Aferoj Dmitrij Mironĉink diris sabate [09 dec 2017], ke reprezentantoj de la gvidantoj de Rusio, Germanio, Francio kaj Ukrainio okazigis nepublikan kunvenon tiutage en Minsko por diskuti pri la situacio en orienta Ukrainio.



Mironĉink diris, ke la kunveno daŭris proksimume kvar horojn, kaj ĉiuj partioj diskutis pri la situacio en Orienta Ukrainio, inkluzive de interŝanĝo de militkaptitoj inter partioj de konflikto en Orienta Ukrainio.

Belorusiaj amaskomunikiloj raportis, ke la interŝanĝo de militkaptitoj okazos probable antaŭ Kristnasko, kaj estas ebleco, ke la tri-partia kontaktgrupo pri Ukrainio anoncos la daton en la venonta intertraktado, kiu okazos en la 20-a de decembro.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# KDPR: Vizito de oficialuloj de UN akcelis interkomprenon

La Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR) diris sabate [09 dec 2017] en gazetara komunikaĵo, ke la vizito de altrangaj oficialuloj de UN helpis akceli komprenon inter la lando kaj la sekretariejo de UN.



La gazetara komunikaĵo, publikigita de la Korea Centra Novaĵ-Agentejo en la lasta tago de la vizito, diris, ke ambaŭ flankoj agnoskis, ke la vizito helpas akceli konfidon inter la du flankoj, kaj ke ili konsentis havi regulajn interŝanĝojn de opinioj per oftaj reciprokaj vizitoj sur diversaj niveloj.

Jeffrey FELTMAN, ĝenerala vicsekretario de UN por politikaj aferoj, kiu estis akompanata de du kolegoj, vizitis Pjongjangon de la 5-a ĝis la 9-a de decembro.

Laŭ la gazetara komunikaĵo, la oficialulo renkontiĝis kun ministro pri eksterlandaj aferoj de la KDPR kaj ĝia vicministro. Dum la renkontiĝoj, ili diskutis pri duflanka kunlaboro inter la lando kaj UN kaj pri la situacio sur la Korea Duoninsulo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Politika ĉefo de UN emfazas urĝecon mildigi streĉecon sur la Korea Duoninsulo

Politika ĉefo de la UN sabate emfazis la urĝecon mildigi streĉecon sur la Korea Duoninsulo post sia kvar-taga vizito al la Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR).



Ĝenerala Vicsekretario de UN pri Politikaj Aferoj Jeffrey FELTMAN diris en gazetara konferenco, ke al la situacio povas esti nur diplomatia solvo, atingebla per procezo de sincera dialogo, kaj tempo estas la esenco.

FELTMAN atingis la KDPR marde [05 dec 2017] por malofta kvar-taga vizito laŭ la invito de Pjongjango. La du flankoj amplekse diskutis pri politikaj demandoj de reciprokaj intereso kaj zorgo.

FELTMAN havis plurajn renkontiĝojn kun RI Yong-ho, ministro pri eksterlandaj aferoj kaj PAK Myong-guk, vicministro pri eksterlandaj aferoj, de la KDPR. Ili interŝanĝis opiniojn pri la Korea Duoninsulo kaj konsentis, ke la nuna situacio estas la plej streĉa kaj danĝera demando de paco kaj sekureco en la mondo. FELTMAN emfazis la bezonon plene efektivigi ĉiujn rilatajn rezoluciojn de la Sekureca Konsilio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Alfred NOBEL

La 10-an de decembro estas la datreveno de morto (en 1896) de la sveda kemiisto kaj filantropo Alfred NOBEL (1833-1896), inventinto, interalie, de dinamito, kaj elpensinto de la Nobel-Premio.



NOBEL mortis en Italio, en Sanremo, kie li estis aĉetinta kaj rearanĝinta vilaon kun aspekto sufiĉe nekutima, kiu hodiaŭ apartenas al la Provinca Administracio de urbo Imperia. En la vilao, malfermita al la publiko, la Fondaĵo Nobel starigis daŭran ekspozicion, titolitan "*Alla Scoperta dell'Ottocento*"(Je la malkovro de la deknaŭa jarcento), kiu prezentas la agadon de NOBEL en la kadro de la ekonomia evoluo de la 19-a jarcento.

Estas elmontrata, interalie, la testamento, per kiu NOBEL (kiu havis nek edzinon nek filojn, kaj estis turmentita de la konscienca riproĉo pro la invento de mortiga rimedo) destinis preskaŭ ĉiujn siajn havaĵojn al la kreo de fonduso, kies interezoj utilu por atribui ĉiujare premion al tiuj, kiuj, en la antaŭa jaro, havigis al la homaro la plej grandajn servojn en la kampoj de Fiziko, de Kemio, de Fiziologio aŭ Medicino, de Literaturo kaj de Paco.

Al la Premioj antaŭviditaj en la testamento de NOBEL aldoniĝis alia, komunuze nomata "Nobel-Premio pri Ekonomiko", starigita de la "*Sveriges Riksbank*" (Sveda Regna Banko), en 1969, memore al Alfred NOBEL kaj por festi la 300-an datrevenon de la Banko. Pri la starigo kaj la pluteno de ĉi tiu Premio (kiu estas transdonata kune kun la "klasikaj" Premioj), la opinioj estas malkonkordaj. Unu el la premiitoj pri Ekonomiko estis (en 1994) la germana esperantisto Reinhard SELTEN (1930-2016).

NOBEL verkis kaj eldonis tragedion en kvar aktoj, titolitan *"Nemesis"*, pri Beatrice CENCI, kies ekzempleroj esti preskaŭ tute detruitaj de liaj postvivantoj, kiuj taksis la verkon blasfema (en ĝi, la katolika kulto al Maria estas konsiderata fonto de krimo). En 2003 aperis ĉe Eldona Societo Esperanto, Stokholmo, dulingva eldono kun titolo "*Nemesis/Nemeza*": la sveda teksto de NOBEL, kaj la esperanta traduko de Gunnar GÄLLMO.

Biografio de NOBEL, verkita de Ernst OLSSON, estis tradukita al Esperanto de Gösta HENRIKSSON, kaj publikigita en 1961 (Malmö, Eldona societo esperanto) kun la titolo "*Kredo, floroj, dinamito*". La titolo, unuavide kurioza, ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi prezentas tri famaj svedojn: Sanktan BIRGITTA (la Fido), la botanikiston Carl *von Linné* (la Floroj), kaj Alfredon NOBEL (la Dinamito). Recenzo pri la libro aperis en "*Esperanto de UEA*" 1962-5, p. 96, kaj reklamo en "*Esperanto de UEA*" 1962-11, tria kovrilpaĝo.

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo

# Restas semajno por kandidatigi al Nobelo

La abonantaro de "*Literatura Foiro*" estas voĉdonanta pri nomo reprezentanta la esperantan literaturon okaze de kandidatigo al la Nobel-premio. La plej oftaj nomoj estas tiuj de István NEMERE, Giorgio SILFER, Trevor STEELE kaj Spomenka ŜTIMEC.



Unua sondado okazis en 2006, kaj ripetiĝis en 2016: ambaŭkaze la preferata estis Marjorie BOULTON. Pro ŝia forpaso la pasintan aŭguston la organo de la Esperanta PEN referendumas denove. Kompare kun 2016, laŭ maldiskretaĵo el la redakcio, la nombro da voĉdonintoj certe pli ol duobliĝos. Ĉi-foje multaj verkistoj partoprenas en la sondado.

La fakto esti la sola virino en la selekto aŭtomate kronas la kroatinon nia plej fama verkistino. Pli malcerta evidente estas la rezulto pri la sinjoroj, ankaŭ ĉar la abonantoj povas indiki eĉ alian nomon ol la tri selektitaj: ekzemple Baldur RAGNARSSON, la preferaton de Akademio Literatura de Esperanto.

Por partopreni en la sondado necesas esti abonanto de LF por 2017, kaj sendi simplan mesaĝon al lofo ĉe esperantio, ĝis 15 decembro 2017 je 20h00 (MET).

HeKo 667 3-B, 9 dec 17

# La arto pri napola pico iĝas homara heredaĵo

Napolo (Itallando) estas la origina loko de la pico. Ĵaŭde la 7-an de decembro la arto de la napolanoj pri picofarado – kiu famigis tutmonde tiun spcialaĵon de la itala kuirarto – estis enlistigita kiel "Nemateria kultura heredaĵo" de Unesko (Unuiĝint-Naciara Edukada [Kleriga], Scienca kaj Kultura Organizo).




Tutmonde du milionoj da homoj aliĝis al la petskribo kiu subtenis la kandidatiĝon de tiu metio, kiu nuntempe estas praktikata en Napolo de preskaŭ tri mil picokuiristoj.

Tiu kuirarta kompetenteco komenciĝis en la 16-a jarcento. Ĝi inkludas miksaĵon de kantoj, ridetoj, teĥnikoj, krom la okulfrapa manipulado de la pastaĵoj.

Decidis la aferon iu interregistara komitato kunvenanta ĉi-semajne en la insulo *Jeju* de Sudkorelando. Entute estas 34 kanditatiĝoj al la listo, kiu enhavas 365 tradiciojn enlistigatajn. Tiu listo de Unesko pri nemateria kultura heredaĵo estis kreita en 2003 kaj ĝi celas tradiciojn, kutimojn, morojn kaj metiojn transdonatajn de generacio al generacio.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## Aleksandr SOLĴENICIN

**Aleksandr Isajeviĉ SOLĴENICIN (Александр Исаевич Солженицын) (Kislovodsk, 11-a de decembro 1918 — Moskvo, 3-a de aŭgusto 2008) estis rusia verkisto kaj historiisto. En 1970 SOLĴENICIN ricevis la Nobelpremion pri literaturo pro sia monumenta verko *La Gulaga arkipelago*.**

**Vikipedio**

---

## Alfred DE MUSSET




**Alfred DE MUSSET (naskiĝis la 11-an de decembro 1810 en Parizo, mortis la 2-an de majo 1857 en Parizo) estis franca aŭtoro.**

**En Esperanto aperis: *La du Amatinoj; La Kapricoj de Mariano; Mimi Pinson.***

**Vikipedio**

---



## Naguib MAHFOUZ

**Naguib MAHFOUZ aŭ Nagib MAHFOUZ (naskiĝis la 11-an de decembro 1911 en Kairo, Egiptio, mortis la 30-an de aŭgusto 2006 samloke) estis egipta verkisto kiu ricevis la Nobel-premion pri literaturo en 1988, iĝante la unua verkisto de araba lingvo kiu ricevis tiun premion.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Ŝtormo sur Jupitero, bildo je oktobro 2017.**

**Vikipedio**